# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si por Hispanio kaj la Homaro

N-RO 7 2-a JARKOLEKTO JAN -85



aej ANDALUZIA ESPERANTO JUNULARO

1985

INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO

Gazeto Andaluzia

Fondita en 1910
de D. JOSE GARZON RUIZ

EDITA - ELDONAS

Asociación Andaluza
de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

REDAKTOROJ

Andrés MARTIN GONZALEZ. Malago
José Mª RODRIGUEZ HERNANDEZ.Kor-
Alberto FRANCO RAMIREZ. Seviljo

ENHAVO

Andaluzio kaj la EEK...1
Informoj...............2
Estrarkunveno..........6
Asamblea General.......8
3a Andaluzia Kongreso..9
Paĝo de la junularo...10
Amuzaĵoj..............11

La opinioj verkitaj en ĉi tiu gazeto apartenas nur al la subskribantoj.

ADRESOJ

GFU (Sección Esperanto)
C/ Trinidad Grund 28, 2º
29001 MALAGA

Grupo de Esperanto IB SENECA
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Sevilja Esperanto Junulara
Organizo SEJO. C/ Pozo 3
41003 SEVILLA

Asociación Sevillana de E-o
C/ Sol 75
41003 SEVILLA

Kunlaboras ĉi-numere krom la redaktoroj:
Petro Gosalvez, Julio Herrero Segura, Rikardo F.A.R.

# Andaluzio kaj la EEK

Laŭ studoj de hispana privata banko kiam en 1986 Hispanio eniros en la Eŭropan Ekonomian Komunumon - EEK, Andaluzio kune kun la Kanaria Insularo estos respektive la regionoj nroj 148 kaj 149 laŭ la riĉeca vidpunkto, tio ne ŝajnas grava sed ĉi konitaĵo atingos precipe sian gravecon se ni scias ke kiam Hispanio kaj Portugalio eniros en la EEK la nombro de regionoj estos 149! Ĉi tiu malhonora posteno kiun nuntempe havas nia aŭtonomia komunumo deziras esti ŝanĝata de la Andaluzia Registaro ekde 1985.

Tri estas la fontoj kiuj ebligos deturni la nuntempan ekonomian situacion. Unue la propra agado de la Andaluzia Registaro, precipe rilate al la agrikulturo kaj al la turismo. Pri la agrikulturo oni devas memori la vizitojn al la ŝtato Israelo kiujn faris kelkaj membroj de la Registaro pro la simileco inter la klimato de Israelo kaj Andaluzio, memoru, ke ĉi mediteranea lando estas vere potenco pri la terkulturado en malfacilaj kondiĉoj. Pri la turismo la Andaluzia Registaro ŝajnas komenci novan turisman politikon kiu pliigos la nombron de altnivelaj turistoj.

La dua fonto kiu permesos plialtigi la ekonomian nivelon de nia regiono estas la Hispana Registaro, precipe rilate al la industria kapablo, kvankam ĉi tiu fako ja estas problemo en nia regiono pro la manko de industrioj kiuj amasiĝas en aliaj regionoj de Hispanio pli proksimaj al Eŭropo. Kvankam oni ja devas agnoski ke kelkaj zonoj de Andaluzio povas riĉigi sian industrian kapablon, ekz. Kadizo kiel ZUR -zono (Zono de Urĝa Reindustriigo).

La tria kaj lasta fonto estas la propra EEK, por Andaluzio la enirado de Hispanio en tiun internacian ekonomian grupon povas esti sukcesa, precipe por la agrikulturaj produktoj kiuj povos trakuri Eŭropon sen problemoj. Ankaŭ Andaluzio povos ricevi milionojn da pesetoj ĉiujare se nia regiono atingas helpon dank' al la PIM (Mediteraneaj Programoj), helpo por la plej malriĉaj andaluziaj regionoj.

Bedaŭrinde kiam Hispanio eniros en 1986 la EEK-n Andaluzio same eniros la malriĉan eŭropan regionon formatan de la sudo de Portugalio, Hispanio, Italio kaj Greklando, kaj se ni komparas neniu el la du lastaj regionoj atingis forlasi sian malriĉecon post eniri la EEK-n, kvankam oni devas agnoski ke nek la sudo de Italio nek Greklando estas tiel riĉa kiel nia Andaluzio.

José María Rodríguez Hernández

# INFORMOJ

## MALAGO

Oni povas diri, ke dum la lastaj **monatoj** preskaŭ ĉiuj niaj agadoj estis direktitaj al la aranĝado de la 9-a HEJS-Renkontiĝo. Oni devas multe labori por tiaj eventoj; disdoni aliĝilojn, fari Renkontiĝlibreton, serĉadi kaj beligi sidejojn por la kunvenoj kaj por tranokti, propagandi loknivele, k.t.p.
Tamen ni ankoraŭ havis tempon por fari jenajn:

- La 10-an de januaro, s-ano Julio Herrero estis intervjuita en Radio Cadena Málaga dum 20 minutoj. Li parolis pri Esperanto kaj anoncis la E-kursojn por komencantoj kaj por infanoj.

- La 14-an de januaro komenciĝis elementa kurso de Esperanto en nia sidejo, kiun gvidas s-ano Julio. Ĝi okazas lunde, merkrede kaj vendrede je la 8-a vespere, kaj komenciĝis per 20 gelernantoj.

- La Meza Kurso, kiun ĉeestas 12 gekursanoj, okazas en ĉiu mardo kaj ĵaŭdo, je la oka vespere, kaj en ĝi ni faras konversacian rondon.

- Nuntempe la "Instruada Sekcio" de AEU en Malago instruas eksperimente ĉiuvendrede per la "Gvidilo por Meza Ekzameno de Esperanto", kiu konsistas el: Gramatiko, Historio kaj Literaturo. Entute 50 folioj. Ekde la monato majo ĝi estas aĉetebla ĉe Libro-Servo de AEU je modesta prezo.

- La 26-an de marto vizitis nin juna esperantistino el Japanio, kiu nomiĝas Ŝoko. Dum 2 tagoj ŝi parolis kun ni kaj poste vojaĝis al Seviljo kaj Granado.

J.H.S.

## KORDOVO

- Jam finiĝis la 5a Elementa Kurso organizata de la Grupo de Esperanto IB "Séneca". Estas 8 novaj geesperantistoj en nia urbo kaj ni esperas ke ili sukcesos en venontaj ekzamenoj kaj kongresoj. La diplomoj estis disdonitaj de la Estraro de la Gimnazio "Séneca" okaze de la Kursfina Festo.

- En la somero de 1985 aperos du numeroj de la revuo LA KORDOVA ESPERANTISTO, kiu tute ne malaperis, malc ĝi mem prokrastis sian aperon pro la eldono de GAZETO ANDALUZIA. La dua numero de ĉi tiu jaro aperos kun la dato 10a de septembro de 1985-a omaĝe al la Jarcento de la naskiĝo de la eminenta kordova esperantisto s-ano FRANCISCO AZORIN IZQUIERDO, en ĉi tiu jubilea numero aperos kelke da studoj pri ĉi tiu samideano.

- Dum la pasintaj kordovaj festoj, fino de majo de 1985-a, gesamideanoj de Malago kaj Seviljo vizitis nin, profitante la okazigon de ĉi tiuj festoj. Ili restis en Kordovo dum unu semajnfino kie ili povis ĝui la mirindan etoson de ĝiaj festoj. Same, ni kune manĝis en la dimanĉo honore al d-ro Zamenhof, t.e. ni prokrastis la 15-an de decembro de 1984a ĝis la fino de majo.

## SEVILJO

- Jam estas pretaj la aliĝiloj kaj programo por la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto (kiu temos pri "Esperanto kaj komputiko" kaj en kiu oni aranĝos, krom seminarioj kaj konferencoj, intensivan kurson pri BASIC). La kongreso okazos de la 15a ĝis la 18a de aŭgusto, 1985. Ĉian informon vi povas mendi de L.K.K. sur strato Pozo, 3, 41003- Sevilla.

- Je la komenco de aprilo, Sevilja Esperanto-Akademio organizas intensivan elementan kurson pri Esperanto por profesoroj de la nacia lernejo de Baza Edukado "La Palmilla" per la nova komiksmetodo "Parolu E-on". Tiuj profesoroj intencas aranĝi kurson de Esperanto por la tieaj lernejanoj venontjare. Ĝis nun respondecis pri tiu nova fako pluraj profesoroj de angla lingvo.

- Jam finiĝis la elementa kurso, kiun organizis S.E.J.O. en la gimnazio "Velázquez". Kvin lernantoj alvenis al la fino kaj pretas prezentiĝi al la ekzamenoj de A.E.U. okazontaj en la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

- La ĵaŭdon 25an de aprilo, samideano Alberto Franco parolis pri "Andaluziaj dialektoj de la hispana" dum la "ĵaŭda parolhoro" tiutaga. Tiun saman prelegeton li deziris prezenti dum la 45-a H.K. de E-o en Cartagena en la kadro de "Sciencaj Horoj".

- La ĵaŭdon 2an de majo, samideano Luis Gilpérez Fraile , prelegis iomete ankaŭ en la kadro de "Ĵaŭdaj Parolhoroj" pri Commodore 64-komputilo. Paralele okazis montrado de in teresaj programoj en tia komputilo.

- Kelkaj seviljaj samideanoj deziras prezenti teatraĵon en la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Samideanino Loli Ga cía respondecos pri la organizado kaj preparado de la akto roj. Se tiu organizado ne sukcesas, la L.K.K. parolos kun la grupo de Malago por ke ili zorgu pri tiu prezentado.

- Post la aranĝoj en la sidejo de strato Pozo, 3, ni infor mas, ke ĝi jam estas denove preta por la akceptado de sen gaj gastoj. Nepraĵoj estas alporti dormosakon (kaj litkov lon en vintro). La sidejon havas tualetejon, kaj la sinba don oni povas fari en la teraso per ŝprucigtubo. Avertu s fiĉe antaŭ ol via alveno al la telefono (954) 37 03 47, a per letero al nia adreso.

Telef. 27 20 01 - 27 72 95
41011 - SEVILLA

Emblemo de la firmo, kiu kunlaboros en nia 3a Kongreso.

## JARFINA KUNVENO DE AEU-ESTRARO

Ĉeestintoj:

Andrés Martín González
Alberto Franco Ramírez
Julio Herrero Segura
Paqui Corrales Guerrero
Eduardo González Ordóñez
Enrique Hurtado Mendoza
Mª José Quesada Mejías
Rafael López Castilla

La 28-an kaj 29-an de decembro kunvenis en Malago parto de la estraro de AEU por pritrakti aferojn koncernantajn al ĉi tiu Asocio. Post longa interparolado kaj laŭ la tagordo, estis konsideritaj jenaj temoj:

1) Por ke AEU funkciu bone estas necese havi bonan organizadon. Do, la ĉefaj taskoj estos farotaj de:

KORDOVO

a) Presado kaj dissendado de "Gazeto Andaluzia", oficiala organo de A.E.U.

- Ĉiu Grupo kaj esperantisto klopodu por la plibonigado de "G.A.".

b) Arĥivejo pri ĉio rilate al AEU-historio.

- Ĉiu Grupo kaj esperantisto sendu ĉian materialon taŭgan por la arĥivo (ĵurnaltranĉaĵojn, anoncojn pri kursoj, fotojn, ktp).

MALAGO

a) Administrejo.

- Oni decidis modelon por leteroj, kovertoj, aliĝilo kaj stampilo.

- Oni kontaktos respondeculojn en ĉiuj andaluziaj provincoj.

- Ni skribos al s-roj Azcuernaga kaj Aragay por peti informojn pri aliĝoj al UEA kaj HEF.

- AEU kontaktos gesamideanojn en Portugalio kaj Afriko (Nordo).

b) Perkoresponda instruado.

- Oni decidis uzi la metodon "¿Sabe usted Esperanto?" de Jorge Hess, por la perkorespondaj kursoj. Libro, vorta-

ro, 2 sonbendoj kaj korespondado kostos 2000 pesetojn. Krome, ni klopodos funkciigi senpagan perkorespondan kurson similan al tiu de ILEI.

- AEU ekzamenos prefere dum la Kongresoj; tamen ankaŭ eblas per korespondo.

- AEU faros gvidfoliojn por la ekzameniĝontoj.

- AEU donos diplomojn.

SEVILO

a) LKK de la 3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

- Oni aprobis la programon por la 3-a Andaluzia Kongreso de E-o, kiu okazos en Sevilo, de la 15-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1985, kaj kies temo estos: "Esperanto kaj komputiko".

b) Libroservo de A.E.U.

- Ĝi ekfunkcios per 10 lernolibroj, 10 vortaroj, kaj 50 Kongreslibroj kaj 50 poŝtkartoj pri la 2-a Andaluzia Kongreso de E-o.

- Libroservo donos al AEU 10 procentojn el la enspezoj.

- AEU kontaktos Eldonejon Sopena, en Sevilo, por ricevi senpagajn propagandilojn.

2) Estis aprobita la Regularo por la Junulara Sekcio de AEU, kies estraron oni starigos dum la venonta HEJS-Tendaro, en aprilo 1985.

3) AEU konsilas kaj petas al ĉiuj andaluziaj Grupoj uzi ĝian nomon, kiel eble plej ofte, en ĉiaj aranĝoj, eĉ lokaj, kursoj, anoncoj, ktp.

La Prezidanto | La Sekretario

Andrés Martín Gonzalez | Julio Herrero Segura

Malago, la 29an de decembro 1984

## ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

## ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

## ASAMBLEA GENERAL DE ASOCIADOS

En virtud de acuerdo adoptado por esta Junta Directiva y cumpliendo lo establecido en el artículo 21 de los Estatutos que rigen esta Asociación, se convoca Asamblea General de Asociados, para el día 16 del mes de agosto de 1985 a las 11 horas en primera convocatoria y a las 11´30 en segunda, en el Instituto "Hogar San Fernando" en la calle D. Fadrique nº 59 de la ciudad de Sevilla, con sujeción al orden del día que se expresa a continuación:

### ORDEN DEL DIA

1º Lectura y si procediere aprobación del acta de la Asamblea anterior.

2º Exposición por el Sr. Secretario de la actividad desarrollada por la Junta Directiva, desde que la misma tomó posesión.

3º Exposición del estado de cuentas de la Asociación.

4º Exposición de las actividades desarrolladas y a desarrollar por los grupos que integran la Asociación Andaluza de Esperanto.

5º Elección de la ciudad y el tema del 4º Congreso Andaluz de Esperanto.

6º Ruegos y Preguntas.

Córdoba a 26 de Mayo de 1985.

VºBº EL PRESIDENTE
D. ANDRES MARTIN GONZALEZ

El Secretario
D. JULIO HERRERO SEGURA

# jam tria kongreso

- Dato: De la 15a ĝis la 18a de aŭgusto ĉi-jare.
- Loko: Seviljo. Kongresejo decidota.
- Temo: "Esperanto kaj komputiko". Tial en ĝi okazos:
    1) Intensiva kurso pri programadlingvo BASIC gvidata de samideano Miguel A. Sancho Pardo.
    2) Debato pri la "fi-negoco en la mikrokomputorvendado". Unu-du personoj enkondukas la temon. La tuta publiko rajtas interveni.
    3) Prezento de programoj por memlernado de Esperanto en Spectrum-48 kaj Commodore-64. Komuna posta provado de komputiloj.

Kunlaboras la firmao MICROSHOP S.A. de Seviljo, reprezentejo de INVESTRONICA en Seviljo, per la pruntedono de komputiloj, ekranoj kaj alispeca materialo.

- La kongreso signifas la konsolidiĝon de A.E.U. kiel forto en la Esperanto-movado. Dum ĝiaj kunvenoj ĉiu rajtas interveni por proponi, kritiki, kunlabori, k.t.p.

- Ne ĉio estas laboro!!! Oni vizitos la faman parkon naturan "Oromana" je nur 9 kilometroj de la ĉefurbo. Tie oni aranĝos kamparan feston.

Oni turismos tra la kvartalo Triana kaj ĝiaj kaŝaj lokoj (ceramikejoj, vinkeloj, preĝejoj, strato de la Inkvizicio, promenado tra l'rivero, k.t.p.

- Aliĝo senpaga por ne-andaluzoj.

Restado senpaga se oni alportas dormosakojn, tamen ni ricevas hotelajn rezervomendojn en la telefono 37 03 47.

Adreso de L.K.K. str. Pozo, 3
E-41003 SEVILLA
Hispanio.

Oni petu de tiu adreso pliajn informojn kaj aliĝilojn.

# ALFEMIAĴOJ

## PAĜO DE LA JUNULARO

Junaj Verkistoj estas kolektivo de junaj esperantistoj, kiu kreiĝis en la 9a HEJS-renkontiĝo okazinta en Malago. Ĝi celas kunordigi la poreldonajn strebojn de la junuloj, kiuj verkas kaj trovis konvena publikigi ĉi tiel. Tiu kolektivo serĉas kunlaborantojn por publikigi literaturajn, kulturajn kaj sciencajn librojn. La unuan subvencios Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj ĝi titoliĝos "PANDEMONIO". En ĝi havos lokon beletraĵoj, eseoj, ktp. Oni petas nur, ke la manuskriptoj estu lingvaĵe kaj stile decaj. Ĝis nun tiun kolektivon konsistigas jenaj personoj: Miguel A. Sancho, Miguel Fernández, Rikardo F. Albert, Georgo Kamaĉo, Alberto Franco, Francisco Pérez, María José Quesada kaj Francisko Ksavero Moleono. La adreso de tiu kolektivo, de kiu vi povas peti informojn, aŭ al kiu vi povas sendi manuskriptojn, jenas:

A.S.S.

Apdo. 6026

41080 SEVILLA

HISPANIO

# AMUZAĴOJ

Solvo de la enigmo de la n-ro 4-a kaj 5-a.

- Kiam Petro decidis iri ĉe Ludoviko samtempe li streĉis sian horloĝon. Kiam li revenis ĉe si li rigardis kiom da tempo pasis:

-Iro ĉe Ludoviko.

-Unu horo ĉe sia amiko.

-Reveno ĉe si.

Li deprenis la horon kaj dividis la ceteran tempon inter du. Do se li vidis la horon post eliri el ĉe sia amiko, li nur devus adicii al tiu konita horo la dividaĵon.

Post la lotado atingis belegan algluaĵon la fraŭlino Ana María Márquez Ortega de Kordovo.


---

Noto de la nova tajpinto: Ĉi tiu estas la unua numero de "Gazeto Andaluzia", kiun mi tajpas, kaj kies enpaĝigon mi kunordigas. Tial bonvolu la leganto pardoni la faritajn misaĵojn, kiuj - espereble - ne ripetiĝos. Ĉi tiu disdivido de taskoj celas sekvigi la ĝisdatigon kaj postan akuratecon de la aperado de ĉi tiu nia gazeto. "Oni lernas per batoj, ne per flatoj", asertas la popola saĝo. Nu, bato estas la lastatempa malfruiĝo de "Gazeto Andaluzia", kaj bato estas la plurflanka misaspekto de la numero, kiun vi legas. Tiaj batoj helpu pliefikigi nian poresperantan agadon.

Rikardo F.A.R.

# KRUCVORTENIGMO

1234567



Aŭtoro: Petro Gosalvez.

Horizontale: 1. Konsonanto.
2. Arbo (sen la lasta vokalo).
3. Demeti malglataĵojn el la surfaco de la aĵoj.
4. Amfibio tre danĝera kiu loĝas en Ameriko.
5. Milda.
6. Rilata al la virina sekso.
7. Vokalo.

Vertikale: Same kiel horizontale.

# ANDALUZIA
# ESPERANTO - UNUIĜO
# (A. E. U.)

POZO, 3
41003 - SEVILLA

TRINIDAD GRUND, 28
29001 - MALAGA

APARTADO 611
14080 - CORDOBA

ASOCIACION ANDALUZA

DE ESPERANTO